



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Simpla : 5 fkoj } Sendotaj al : Micard Henri
Bonfara : 10 fkoj } Epineux-le-Seguain (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagó 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1962

6

KULTURAJ KAJEROJ

1962

Novembro - Decembro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO



Kelkaj pensoj pri la informiloj (P. Babin).
Esperanto tra la mondo.

El la lando de la 48-a UK

La freskoj de la preĝejo en Bojana
(Mara Conĉeva).

Kelkajn minutojn kun...

Prof. G. Waringhien.

La Pask-insulo :

Ĝia vera mistero.

El la prelegoj en Gresillon :

Frédéric Chopin (R. Dupuis).

La plej nigra poeto :

Ambrose Bierce.

Por via distro :

Nia konkurso.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Kelkaj pensoj pri la informiloj



En la naciaj gazetoj oni de tempo al tempo legas artikolojn, kies temo estas la « kverelo » inter la « presa informo » kaj la « parola aŭ bilda informo ». Ĉu tiu kverelo ne estas tute sensenca ? Oni povas ŝati la presan gazeton pli ol la parolan sed pluraj faktoroj ludas favore al la lasta. La du ĉefaj faktoroj estas socia kaj teknika.

Fakte la homoj disponas malpli da tempo ol antaŭ pluraj jaroj por legi. Ĉiu homo konsentas legi tion, kion lin interesas sed ne longe kaj ne pli : la sportamanto, la sport-paĝojn, la teknikisto, la artikolojn pri sia specialigo, ktp. Kaj pri la informoj ? nur la titolojn. Atingas grandegan preskvanton nur la gazetoj, kiuj kovras siajn paĝojn per multaj bildoj, multaj dikaj titoloj kaj malmultaj, mallongaj artikoloj ! Oni ilin legas en la trajno aŭ aŭtobuso survoje al la laborejo. Oni ŝparas tempon, kiam oni povas tag aŭ vespermangante ricevi la informojn de la radio aŭ de la televido. Kiucele ŝpari tempon ? Ĉu oni laboras pli multe ? Kelkafoje jes ! Sed plej ofte oni profitas la liberan tempon per modernaj akiraĵoj : motorbiciklo, aŭtomobilo, televido, kino, ktp.

Krome, oni ne haltigas la teknikan progreson. Ed. Branly ne permesis al siaj infanoj legi la librojn de J. Vernes, kiuj malbone influus iliajn junajn spiritojn kaj rezignis siajn eksperimentojn pri la ondoj kaj ankaŭ Hertz same faris. Sed antaŭ kelkaj semajnoj naskis « Telstaro ». La scienculoj eltrovas, elpensas sed ankaŭ trovas aŭ malkovras neatenditaĵojn. Kaj de tiu momento tiuj malkovraĵoj vivas kun ni ; ni ne permesu, ke ili vivu kontraŭ ni kaj pro tio ni devas interesiĝi pri ili ; ni povos ilin « malsovaĝigi » nur per uzado, ni ne permesu, ke ili vivu ekster ni. Ni sukcesos ilin adapti al ni nur se ni unue adaptiĝos al ili.

Post tiu konstato pri la faktoj, kion fari ? Ĉu lukti kontraŭevolue ? Ĉu oni povas devigi la homojn preferi la legadon ol la aŭtomobilon,

kiam ili scias, ke ili ĝuos la informojn dank'al la radio dum la veturado ? Ĉu oni povas konvinki ilin, ke estas pli agrable sin klini sur longa artikolo kun vortoj kelkafoje ne ofte uzataj, ol komforte sidi en fotelo kaj rigardi la televidaparaton kiu per bildoj rekte « parolas » al li ? La homoj pli kaj pli informiĝos tiamaniere ĉar en la lernejo la infanoj kutimiĝas al instruado per aŭd - kaj vid - rimedoj kaj ĉar tiuj informiloj pli kaj pli progresos. Post la sukceso de « Telstar » oni rajtas pensi, ke post du jaroj ekzistos la « mondovido ». En 1964 oni povos en ĉiuj partoj de la mondo « ĉeesti » la Olimpiajn ludojn de Tokio. Post kvin aŭ ses jaroj oni povos elekti per unu nura aparato iun ajn el la diversnaciaj televidprogramoj, kiel oni nuntempe elektas el la radioprogramoj. Dank'al la transistoroj la radio, kaj televido-aparato, ne plu estas fiksjaj. Ni povas antaŭvidi tempon kiam tiuj aparatoj estos ne pli dikaj ol malgranda ŝtopilo, kiun ĉiu el la homoj povos meti laŭvole en la orelo. Oni eĉ povas pensi (aŭ revii..., kiel J. Vernes ?) pri venĝo de la skriba informado : gazeto presita en la hejmo, dank'al ondoj.

Kaj oni ankoraŭ pensas pri la « protektaĵo » de la skriba informado ! Sed la homoj eĉ « progresemaj » defendas sian neston, siajn kutimojn. Niaj prapatroj defendis la oleo-lampon, kontraŭ la elektro-lampon, kiu bruligus la okulojn kaj faligus la fulmo-tondron. Ili adaptiĝis, utiligis la elektron kaj ne estis bruligitaj (almenaŭ ne pli ol per falintaj kandeloj aŭ oleo-lampoj !).

Ankaŭ niaj praŭloj adaptaĝis al la presita informado ĉar, antaŭe, ili konis nur la... parolan informadon kaj la tam-tamon !

P. BABIN.

Esperanto tra la Mondo



La universala kongreso 1963 en Sofia

— La kongresejo estos la ŝtata universitato.
— La konstanta adreso de la Kongreso estas ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam

2, Nederlando.

— Por « bulgara vespero », la kluboj povas ricevi senpage el tiu adreso, sonbendon kaj ekzemplerojn de la 8-paĝa unua bulteno ;

— La infana kongreseto okazos en la Domo de la Junpioniroj en Sofia.

— La dua Internacia arta Festivalo okazos samtempe kun la kongreso.

La « Karavano de Amikeco » tra Afriko

— La internacia karavano de S-ro Sekelj, la konata esperantista etnologo, jam trairis Turkujon, Sirion, Libanon, Egiptujon, Sudanon, Etiopion, Somalion. Krom efektivigo de scienca, esplora agado, la trapaso de la karavano estis, en diversaj lokoj, okazo de utila informa laboro por la internacia lingvo.

Dua laborplano da U.E.A.

— La revuo « Esperanto » de oktobro publikigis la 28 punktojn de la dua baza laborplano de UEA por la proksimaj jaroj, sur la internacia, nacia kaj loka terenoj.

Internacia propaganda afiŝo je via dispono

— UEA eldonis kvarkoloran modernan afiŝon kun taŭga blanka spaco por nacilingva teksto (sur la afiŝo krom la desegno, estas nur la vortoj : internacia lingvo esperanto). Ekzistas 2 formatoj : 47,5-59 cm. kaj 58,8-83,2 cm. Uzu ĝin grandskale (ankaŭ en lernejoj kaj universitatoj) !

Por la junularo

— En Romo, dum julio, 50 gejunuloj el 13 landoj ĉeestis la renkonton organizitan de la Popolaj Universitatoj.

— Dum la Tutmonda Festivalo de Junularo, en Helsinko, ankaŭ 50 junaj geesperantistoj el 13 landoj, havis specialajn kunvenojn.

— Denove, dum la kultura semajno kiu okazos en la esperanta Kulturdomo de Grésillon, dum Paska Ferio, junuloj el la porinstruitaj francaj seminarioj povos ĉeesti dank'al oficiala subvencio.

— « Esperanto » de oktobro publikigis la demandojn de konkurso pri Bulgario.

La junuloj kiuj bone respondos povos ricevi premiojn okaze de la Internacia Junulara esperanta kongreso de Vraca (27-7 - 3-8-63).

Alvoko al esperantaj infanoj por Radio-Hilversum

— La respondeculo de esperanto-dissendo en Radio-Hilversum ege bezonas por dissendoj, sonbendojn kun registro de programeto de grupo de esperantaj infanoj. Skribi al S-ro H. Brockhuizen, Radio-Hilversum (A.V.R.O.), postbus 2, Hilversum (Nederlandoj).

Bonega filmo en esperanto

— Ni atentigas la grupojn pri la bonega filmo « Bonvenon al Oslo », kolorfilmo 16 mm. esperantlingva. Por prezenti tiun duonhoran filmon, rilatu kun : Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Senpaga bulteno

— La kluboj povas senpage ricevi, laŭ dezirata kvanto, la bultenon en esperanto : « Occidentgermana revuo ». Petu ĝin al : S-ro Jos. F. Berger, Koln-Riehl, Ehrenbergstr. 1, Germanujo.

La bulteno estas dumonata.

Esperantaj poŝtmarkoj

— En Bulgario, oni emisiis la poŝtmarkon pri la 70a datreveno de esperanto kun surpriso pri la 35a esperanta bulgara kongreso kaj ŝanĝo de valoro.

— Polujo emisiis poŝtmarkon por la 75a datreveno de esperanto.

Surdiska kurso por franclingvanoj

— « Editions Françaises d'Esperanto » ĵus eldonis kurson de esperanto sur 6 diskoj mikrokanelaj 45 t., registritaj de esperantistoj el 12 landoj.

Krom la 6 diskoj, la kurso entenas 7 libretojn.

Jam, tiu eldonejo eldonis du diskojn, tute en esperanto, por perfekta prononco (liveritaj kun la teksto).

Gratulon al la eldonisto, S-ro Ribot !

El la lando de la 48-a U K

La freskoj de la Preĝejo en Bojana

En la fino de la XIV-a jarcento Bulgario falas sub pezan kvincent-jaran turkan jugon. La turkaj konkerantoj barbare prirabis, neniiĝis kaj detruis la plej rimarkindajn bulgariajn belartajn monumentojn ne nur en la ĉefurbo, sed ankaŭ en la tuta lando. Nur tie kaj tie restis nedifektitaj unuopaj monumentoj trovigantaj for de la vojo de la turkaj hordoj. Estas preskaŭ plene konservitaj la freskoj de la malgranda preĝejo en vilaĝo Bojana, kiu troviĝas sur la teritorio de la nuna bulgara ĉefurbo Sofio.

Tiel la preĝejo mem, kies tri partoj estis konstruitaj en tri diversaj periodoj (XI-a, XVII-a, XVIII-a kaj XIX-a jarcentoj), kiel ankaŭ la freskoj datiĝas de tri diversaj periodoj. De la freska ornamo datiĝanta de la XI-a - XII-a jarcento restis nur unuopaj fragmentoj, kaj en la parto konstruita en la XIV-a jarcento freskoj mankas. La du malnovaj partoj de la preĝejo nun estas kovritaj de freskoj datiĝantaj de la XIII-a jarcento (1259). Ĝuste ili estas konsiderindaj, ili estas nun ne nur la plej eminenta manifestajo de la iama skolo de Tirnovo, sed prezentas ankaŭ veran « majstroverkon de la Balkana pentroarto de ĉiuj tempoj », kiel tre trafe ilin pritaksis la granda franca bizancologo André Grabar.

La interno de la relative malgranda preĝejo estas pentrita per diversaj kompoziciaj scenoj dediĉitaj ĉefe al la vivo de Kristo, Dipatrino, Sankta Nikolao, kaj ankaŭ per multnombraj unuopaj figuroj de diversaj sanktuloj. Gravan lokon en la preĝejo okupas du grandaj, reprezentaj duopaj portretoj — de la tiama bulgara reĝo Konstantino Aŝeno kaj reĝino Irina, kaj de la donacintoj de la preĝejo — la feŭda reganto de la distrikto, sevastokratoro Kaloĵano kaj lia edzino Desislava. La figuroj en la portretoj distingiĝas per eksterordinara beleco, kiu venas ne tiom de ilia majesta eksteraĵo, de ilia juneco, beleco kaj riĉaj vestoj, kiom de la neordinara

profundeco kaj komplike animita psikologia portreta karakterizo, kiu atingas tiel profundan penetremon, ke vicigas la portretojn inter la plej konsiderindajn portretojn el tiu epoko ne nur en nia lando.

Tiu ĉi trajto — la granda intereso al neripetebla individua psikologio, ekskluzive subtila resonemo al la plej sensignifaj kaj malsimplaj vibradoj de la homa psikologio, estas trajto karakteriza por la nekonata pentristo de Bojana, manifestita en ĉiuj figuroj kreitaj de li — unuopaj aŭ artoprenantaj en la diversaj kompoziciaj scenoj. Pro tio la spektanton altiras kaj ravas la unuopaj figuroj kaj la dramaj situacioj, kaj ne la evan-



gelia r. konto. La multnombraj figuroj kreitaj de la pentristo de Bojana suferas, ĝojas, atente observas, pensas aŭ filozofie meditas, ili vivas kaj agas en la bildo kiel komplikaj, riĉe dotitaj homaj estaĵoj.

La strebado al individua karakterizado tamen ne estas farita malprofite al la perfekta homa beleco, kiu estis por la pentristo idealo, modelo por plej perfekta homo el vidpunkto de la tiama epoko. Pro tio li saturis siajn figurojn per granda homeco kaj animbeleco. Tio estas la dua tre karakteriza trajto propra al la kreadaj specifajoj de la freskoj de Bojana — ilia granda humaneco.

En la freskoj de Bojana ni malkovras ankaŭ pure bulgarajn, naciajn trajtojn. Laborante pri siaj neripeteblaj figuroj la pentristo evidente estis inspirata de la vivaj homoj ĉirkaŭantaj lin. Li spegulis ankaŭ apartajn elementojn de la nacia bulgara vivmaniero tie, kie la kreatoro permesis tion. (En la manĝotablo de la « Sankta Vespermanĝo ».)

La pentristo de Bojana montris ekskluzive grandan majstrecon en la ĝenerala kompozicia solvo de la pliparto de la pentritaj

scenoj. Kun granda sento pri mezuro li sukcesis interligi la pentritajn scenoj. Kun granda sento pri mezuro li sukcesis interligi la pentritajn scenojn kaj figurojn, trovi iliajn ĝustajn dimensiojn kaj formojn proporcie al la arkitekturo de la konstruaĵo, ne referante la murojn kaj ne neniigante ilian arkitekturan strukturon. Male, la freskoj subtrekas la belecon ankaŭ de la arkitekturaj formoj.

La freskoj de Bojana estas vere ekskluzive valora belarta aperaĵo en la evoluo de la malnovbulgara pentroarto. Ĉi tiu lasta atingas en ili vere grandan, alte artistan portretan realismon kaj humanecon, eksterordinare komplikan profundecon de la nuanco de la esprimo de l'vizaĝoj, kian ni en tiu periodo ne trovas ĉe la bizanca arto kaj ankaŭ ĉe la itala pentroarto. Ĉi tie jam estas sugestitaj aferoj, kiujn pli malfrue Giotto proponas al la homaro, kiel grandajn mondajn malkovraĵojn.


Prof. Mara Conĉeva.

Plej plaĉa estas la legado de « Kulturaj Kajeroj »

dum la vintraj vesperoj

REABONU --- ABONU

ABONICU VIAJN AMIKOJN



INTERVJUO

Kelkajn minutojn kun

Prof. Gaston WARINGHIEN

Antaŭ kelkaj monatoj aperis impona esearo titolita « Lingvo kaj vivo ». La septembra numero de « Esperanto » informis, ke tiu verko estis elektita « Libro de la Jaro » de la Esperanta Studo-Klubo (Londono), ĉar « ĝi plej multon kontribuis al la antaŭenigo de Esperanto ». La verkinto de la « Libro de la Jaro » estas Profesoro Gaston Waringhien, unu el la « leonoj » de nia movado.

Membro de la Akademio, verkinto, kun Kalocsay, de la « Plena Gramatiko », kun Prof. Grosjean-Maupin, A. Esselin kaj S. Grenkamp-Kornfeld de la « Plena Vortaro », Prof. Waringhien partoprenis en la starigo de la literaturaj Esperanto-monumentoj. Amanto de nia lingvo, li ĉiam provis montri ĝian esprimopovon kaj multe interesiĝas pri la esperanta poezio. Kun K. Kalocsay li verkis la « Parnasa Gvidlibro » kaj tradukis « La Floroj de l'Malbono », kiu prezentas evoluon de la Esp.-poezia lingvo. Ankaŭ pro aliaj motivoj Prof. Waringhien meritas la dankemon de la esperanto-lingvanoj. Despli honoras nin lia konsento respondi niajn demandojn, ke li ordinare ne ŝatas respondi intervjuantojn.

P. BABIN.

..

Cu vi konsideras Esperanton specialigo en via profesio aŭ flanka aktiveco?

Esperanto estis ĉiam por mi specialigo de mia profesia laboro ĉar ĝi prezentas tre interesan terenon de la lingvistiko.

En la « Parnasa Gvidlibro », kiun vi verkis kun Kalocsay, vi pritraktis la teknikan flankon de la Esp. poezio. Kia estas poezio por vi?

Mi ne ŝatas paroli pri la poezio ĉar mi konsideras, ke oni ĝin amas aŭ ne amas.

Por la amantoj, la Esp. poezio estas io kara kaj iel suverena. Por la aliaj ĝi estas io nekonata.

En la sama libro vi registris la neologismojn aparte utilajn en poezio. Kio estas neologismo?

La vortoj, kolektitaj en la Parnasa Gvidlibro, estis tiam uzataj de multaj jaroj, kaj la vere utilaj estas nun do enirintaj en la uzadon. Nomos ilin « neologismoj » nur la esperantistoj, kiuj nenion legis de antaŭ tri-dek jaroj. Neologismoj oni povas nomi vortojn kiel « sputniko », « telstaro », « asembleo », ktp. Ĉu oni ilin diskutas?

Multaj gesamideanoj ne havis la okazon ĉeesti la Internacian Someran Universitaton, en kiu vi mem prelegis. Ĉu vi povus diri kelkajn vortojn pri ĝi?

La Internacia Somera Universitato estas speciala kultura institucio de U.E.A., kies celo estas la popularigo de sciencaj kaj artaj branĉoj pere de Esperanto. Rajtas prelegi universitataj profesoroj kaj rekonitaj fakuloj. ISU regule funkcias dum la Universalaj kongresoj de Esperanto. La prelegoj temas pri tri ĉefaj branĉoj: naturaj sciencoj, sociaj sciencoj kaj filozofio, Arto kaj Literaturo. La prelegoj estas ĝenerale vizitataj de pluraj centoj da aŭskultantoj.

Apud via nomo ofte aperas la nomo Kalocsay. Kiu estas Kalocsay?

Kalocsay ne estas por mi nur lingvisto, sed ĉefe admirinda poeto. Kaj mi ne pensas nur pri la tradukinto de « Infero » de Dante, pri la ĉefredaktoro de la tre grava kaj bela Hungara Antologio, kies poemojn li mem preskaŭ ĉiujn tradukis, sed ankaŭ pri la virtuozo de la « Eterna bukado », kiu prezentas poemojn el 22 lingvoj. Kalocsay majs-

trus ĉiujn formojn de la poezio : la aleksandron, la italan vercinon, la francan baladon, la soneton, la trioletan, la rondelon, la japanan « tanka ». Li ne estas nur talenta sed genia poeto.

Kun Kalocsay vi verkis la « Plena Gramatiko ». Oni kelkafoje aŭdas nefavorajn parolojn pri tiu verko : ĝi entenus nur « komplikajojn ». Ĉu vi povas diri kial kaj cele al kio vi ĝin verkis ?

La dikeco kaj, ŝajna, ni diru, komplikeco de la Plena Gramatiko venas de du fontoj : la unua, la ĉefa, estas la ekstrema komplikajo de la naciaj lingvoj en la uzado de la esperantistoj ; la dua estas la tute nova kaj aparta karaktero de Esperanto, kies kons-

truo ne estas tiu de hind-eŭropa lingvo : por klarigi tion, ankaŭ ni devis dediĉi multajn paĝojn, ne ĉar la konstruo de Esperanto estas malfacila, sed ĉar ĝi estas nekutima al la plimulto de la eŭropanoj.

Vi ankaŭ verkis vortarojn. Kiuj estas la malfacilaj renkontitaj de vortaristo ?

La ĉefa malfacilo, kiun renkontas vortaristo, estas la manko de multaj vortoj aŭ kunmetitaĵoj por nomi la plej ordinarajn uzaĵoj de la ĉiutaga vivo : tion Esperanto povos akiri nur iom post iom, laŭ la grado, kiel ĝi fariĝos la intima lingvo de multaj personoj.

(Ni ricevis de S-ro P. Marly valora, malno-va esperantisto la jenan alvokon al « paciĝo » kiun ni tre volonte publikigas.

Ni estu pacemaj

Ĉi-sube mi ne volas polemiki, sed, male, montri pacigan vojon.

De longe ekzistis esperantistoj, kiuj aplikis la Fundamentan gramatikon, laŭ kiu la pasiva participo en « ata » montras la agon, la participo en « ita » montras la rezulton.

Sed ankaŭ de longe ekzistis aliaj esperantistoj, kiuj diris : oni devas konsideri la « aspekton » kaj, sekve, kiam la ago estas tiel mal-longa, ke ĝi preskaŭ koincidas kun la rezulto, uzi la finiĝon « ita ».

Iuj kaj aliaj sin tre bone komprenis, ĉiuj komprenis ilin, kaj la plejmulto el la samideanoj eĉ ne atentis la diferencon.

Kial tio ne povis daŭri ? Kial subite iuj malkovris, ke la « atistoj » endanĝerigas Esperanton, kaj sur ili ĵetis la anatemon ?

Tio estas malbona ago. Dro Zamenhof, per la kreo de internacia lingvo, esperis estigi la pacon en la tuta mondo. Almenaŭ ni, esperantistoj, konservu ĝin inter ni.

P. MARLY.

POR GRAVA ENKETO

Ni bezonas vian helpon.

Ĉu en via lando aperis verkoj, artikoloj aŭ enketoj pri detektiv-romanoj ?

Ĉu vi povas ilin komuniki al ni ?

Ni repagos per respondkuponoj aŭ aliaj rimedoj ?

Ĉu vi, aŭ amikoj viaj, konsentus res-

pondi la demandon :

Ĉu vi ŝatas aŭ ne ŝatas la detektiv-romanojn ? Kial ? »

Ni plezure ricevos viajn respondojn.

Sendu leterojn aŭ materialon al :

*S-ro Thébaud, instruisto
Caudry (Nord) - Francujo*

LA PASK-INSULO

Gia vera mistero

De pli ol du jarcentoj tiu izolita insuleto en la Suda Pacifiko prezentas misteron : la gigantajn statuojn, kiuj staras ĉirkaŭ la vulkano Rano-Raraku, kaj ankaŭ ĉe la mara bordo. Ĉar en tiu insulo vivas nur malmultaj homoj kaj preskaŭ neniuj arboj, oni miras pri tiuj, kiuj transportis tiujn statuojn, el kiuj kelkaj pezas 20 tunojn.

Sed ekzistas alia mistero pli granda, ĉar oni ankoraŭ ne sukcesis kontentige klarigi la specon de skribo, kiun oni trovis en tiu insulo enloĝata de popolo de la ŝton-epoko.

Sur malnova lignopeco ĉirkaŭvolvita per longa har-ŝnuro (donaco al pastro) oni vidis samaltajn, zorge vicigitajn figuretojn. Oni tuj pensis pri la egiptaj hieroglifoj. Jam en kabanoj estis trovitaj similaj figuretoj sur bastonoj kaj ankaŭ sur tabuletoj. Ĝis nun estis kolektitaj 24 tabuletoj.

Kiam oni trovis la unuajn tabuletojn la antikva Paska civilizo jam preskaŭ tute malaperis pro la rabekskursoj de la Peruanoj. Sed ankoraŭ vivis kelkaj paskaj « scienculoj ». Demanditaj pri tiuj figuretoj la scienculoj ne « legis » sed « psalmis » ilin. Foje la teksto de la psalmo estis skribita de aŭskultanto : la kanto ne konsistis el logika disvolviganta teksto sed el frazopecoj elvokitaj de la figuretoj. Eĉ okazis, ke iu maljuna scienculo deklamis longan tekston ne rimarkante, ke de tempo al tempo oni ŝanĝis la tabuleton. Tute malkuraĝigitaj, la etnologoj ne plu faris tiajn provojn. Kaj poste mortis la lasta reprezentanto de la tiamaj « scienculoj ».

Sed oni daŭre pensis pri tiu problemo. La specialisto Alfred Metraux konkludis, de la fakto, ke la indiĝenoj ne « legis » sed « deklamis » aŭ « kantis » la figuretojn, ke la tabuletoj estas pictografioj, speco de « meomrlibretoj » : ĉiu figureto korespondus al frazo, verso aŭ eĉ tuta strofo de kanto aŭ legendo.

Sed komparante tiujn figuretojn kun la meksikia kaj maja-a skriboj li pensis, ke, eble temis pri vera skribo, parte ideografia

parte fonetika, ĉiu figureto elvokanta ŝlosilvorton.

Aliaj komparoj estis faritaj. La hungara lingvisto M. Hevery konstatis similecon inter la Paska « skribo » kaj la skribo malkovrita en la ruinaĵoj de urboj en la valo de la rivero Induso. Sed ekzistas ankaŭ tro multe da malsimilaĵoj inter ambaŭ skriboj.

Aliaj etnologoj kaj arkeologoj trovis similaĵojn kun dumiljara skribo de Suda Ĉinio, kun desegnoj de Indonezio, kaj kun skribo de Cejlo.

Sed, kiaj, ajn estas la Paskaj figuretoj, oni povas pensi ke tiu skribo estis elpensita en la insulo mem, verŝajne surbaze de iu mnemonika sistemo alportita tien de la anĉestroj. Se oni pruvos, ke tiuj figuretoj estas veraj hieroglifoj « legeblaj », la Paskanoj kiuj ja mmirigis la mondon per altkvalita arto kaj grandiozaj monumentoj, rajtos eĉti fieraj ankaŭ pro geniaĵo.

(El artikolo aperinta en Le Courrier de l'Unesco).



El la muzik-kulturaj prelegoj en Grésillon 1962

Responde je la deziro de S-ro Babin, mi volonte resumas ĉi tie por nia revuo prelegon prezentitan en la kastelo pasint-julie por entute

kvindeko da personoj en la daŭro de tri horoj apartigitaj).

FREDERIC CHOPIN

la animo de l'piano

Jam kiel infano mi havis admiron sinceran al tiu komponisto. Tial mi volis iom post iom lin imiti kaj penetri. Kaj nun ankoraŭ same sincera estis mia ĝojo en Grésillon, ke mi povis rakonti pri liaj vivo kaj verko, montri kvar bildobendojn al mi donacitajn de l'Pola Ambasado en Stokholmo, ludi dekduon el liaj mondfamaj komponaĵoj kaj eĉ, dank'al la ĉeesto de radio-prelegisto S-ro Lutogniewski el Varsovio, korekti mian elparolon de la polaj nomoj.

La komencon mi volis konstrui sur fantazio... fantazio tamen interesa pro la provizitaj, absolutaj veraĵoj :

« Mi sonĝis pri kvereleto inter Lutogniewski kaj mi !... »

Dupuis asertis : Chopin estis pli franca ol pola.

Lutogniewski protestis : Chopin estis pli pola ol franca.

Dupuis diris : Lia patro estis franca.

Lutogniewski aldonis : ...Sed lia patrino estis polino.

Dupuis plu atakis : Li preferis vivi en Francujo.

Lutogniewski plu defendis : Li naskiĝis kaj edukiĝis en Polujo.

Dupuis (plej solene) : Lia korpo estas entombigita en pariza tombejo !...

Lutogniewski (plej religie) : Lia koro estas enmurigita en preĝejo varsovia.

Fino de l'sonĝo.

Kaj kion konkludi, se la sonĝoj havas signifon ?

Iel ajn Chopin fariĝis same kiel Zamenhof, ambaŭ sekve l'amplekso de sia genio, kvazaŭ postmorta mondĉiviano, amata kaj admirata sur la tuta terĝlobo de ĉiuj sentemaj muzikamantoj.

Kaj jen fundamenta trajto de lia verkaro evidente influita de liaj malfortiko kaj formigro : profunda melankolio. Ni pensu ekzemple pri lia Etudo Op. 10, n-o 3, kromnomata Malĝaĵo.

De kie venas la eleganto, rafino de liaj Nokturnoj ? Sendube ili venas grandparte de tio, ke la infano kreskis meze de polaj nobelaj familioj.

La voĉoj de Chopin estas kreitaj por dancigi feinojn. Kaj en la Valso de l'Adiaĉo, dediĉita al amikino de l'fruaj jaroj Maria Wodzinska, muzikkritikisto trovas tiun muzikan korelverŝigon de l'juno tute kontrasta kompare kun la blekoj amĉagrenaj de Hector Berlioz...

Chopin forlasas Polujon en 1830, ricevinte en argenta pokalo polan teron... por ke li neniam forgesu...

Jaro 1831. En Stuttgart-gastejo la jam fama formigranto tondrigas sian Revolucio-etudon ĵus inspiritan de refoja varsovia ribelado sufokita.

Sed Parizo altiras la virtuoza-komponiston. De kiu granda artisto povas Parizo resti ignorata ? Parizo grandioza, ĝuste tiu Parizo duoble katenita de l'anĝeloj de l'Bono kaj de l'Malbono, Parizo kun sia pura arto animleviga, Parizo kun siaj pereigaj homaj intrigoj...

Tie, Chopin trovas tuj artistan medion, kies dragoneta elemento : virmaniera verkistino

George Sand, ludos en lia vivo tiel fatalan rolon. Ĉar kiel povus vireca virino harmonii kun virineca viro?

Cetere Chopin vivas pleje por sia muzika Muzo. Unue la vulgara publiko ne komprenas lin. Sed li baldaŭ triumfas, eĉ je la pri li mirinta kaj cerbuminta kritikistaro.

Vintro 1838. Vojaĝo al Majorko. Plua komponado, kaj progresa malsano en malseka klimato. Unua kuracisto deklaras al la kompatindulo : « Vi estas mortonta ». Dua kuracisto : « Vi estas mortanta ». Tria kuracisto : « Vi estas mortinta ». Kaj el tiu restad-epizodo, el tiel tranĉaj mort-asertoj, rezultis la tiel edifa kaj ŝajne senmorta Preludo de l'Pluvĝuto.

La Polonezoj de Chopin dirigis iam la jemon : Se la rusa imperiestro povus kompreni, kiel pli danĝera ol kanonoj estas tiu Opus 53, li certe starigus ian ĉinan muregon fronte al Polujo. Kaj kion diras Franz Liszt tiurilate « La Polonezoj estas energiaj patriotaĵoj. Ili skuas eĉ la plej indiferentan animon. En ili retroviĝas la nobelaj sentoj tradiciaj de la malnova pola lando : militistaj gravo, kuraĝo kaj decidemo. Kelkaj Polonezoj igas nin aŭdi la pezan, imponan, aŭdacan rajdodon de brilaj grupoj en la Mezoriento. Kapitanoj portas malnovajn kostumojn el veluro, zibelfelojn, riĉajn juvelojn inkrustitajn sabrojn, franĝohavajn zonojn, ŝuojn ruĝigitajn de piedpremita sango, ĉapojn brilajn kun ankoraŭ pli valoraj ornamaj gemoj, gantoj kun parfumo de haremo, ktp... Persaj tapisŝoj, mebloj de Konstantinoplo, arabaj ĉevaloj kurantaj en la malproksimo, ĉio tio elstaras sur la fono senkolora de la tempo ».

Nia famulo, kiu fariĝis preskaŭ nur skeleta, fantoma, de si mem fizike kvazaŭ la ombro, tamen ankoraŭ sukcesas ĉerpi fortojn kaj kuraĝon por iri al Londono kaj Edinburgo kaj ravi Reĝinon Victoria per siaj valsoj jam aluditaj. Sed nun ne nur lia sano sed ankaŭ lia ekonomio ruiniĝis. Jam antaŭe rompinta kun Chopin, Sand rifuzas fari al li lastan adiaŭon, kiam li agonias en sia 40-a jaro, Place Vendôme, n-12 en Parizo, la 17-an de oktobro 1849.

Sed, ĉu Frédéric Chopin vere mortis?

Kiu povas aserti, ke lia spirito neniel perceptis la sonojn de sia propra Funebra Marŝo, kiam Parizo faris por li pompan enterigan ceremonion?


Impresa komponaĵo, kiu ja tiel peze, preme kaj nepre sentigas la maĝojn kaj doloron, sed ankaŭ klare, lume kaj brile prikantas dolĉan animliberiĝon eble jam en ia kontakto kun ĉielo-inspirinta. Por fini la tutan prezentadon mi ludis ankaŭ pro du apartaj kaŭzoj alian konatan pecon : « BERCEUSE » (Lulaĵo). Unue, por montri, ĝis kiu grado Chopin sciis eltiri subtilon sentfine varian kaj ornaman el la nura unika piano-instrumento, kiun li preferis je tuta orkestro. Due, pro pravi la sinceron de mia deziro je bona nokto al la dankemaj ĉeestantoj?

Tuj antaŭ ties ludo mi avertis pri tiu mistera ne atendenda noto, kiu ekruligas finan melodion vaporan kaj arabeskan, kaj pri kiu mi atentigos per fingrosigno en la ĝusta momento... Nu, la noton devis rimarki tiuj, kiujn la lulaĵo jam ne endormigis. Aŭ ĉu mi mem eble, lulate ekdormetis sur la klavaro kaj forgesis la fingron levi?

ROLAND DUPUIS.



MALGRANDAĴOJ



Tiu skizo de moderna altforno funkcias. Ĝia konstruo postulis plurajn mintojn da horoj de la junaj metilernantoj de granda uzino. Oni povas vidi ĝin en la Muzeo de la Nacia Konservatorio de Artoj kaj Metioj.

Tiu aparato estas la plej malgranda « mensog-signilo » en la mondo. Ĝi estis fabrikita en Tokio. Ĝi kostas nur malaltan prezon.



La plej nigra poeto :

Ambrose Bierce

« Bitter Bierce » (Bierce la Amarulo), la viro, kiu verkis « per sango, glacio, galo kaj mallumo » naskiĝis en Ohio, kiam Edgar Poe mortis, kaj nur kelkajn jarojn post la naskiĝo de Mark Twain en 1842. Ĉar lia familio estis tre malriĉa kaj lia patro tre stranga, li malamis la familion kaj malriĉecon. Juna partoprenanto en la civitana milito, serioze vundita, li konatiĝis kun la morto kaj la kruelaĵoj. Valora ĵurnalisto li ludis per vitriolo. Edziĝinte al belega junulino, lin ŝin lasis por fariĝi orserĉisto. Reveninte al ĵurnalismo li eksedziĝis. Patro de du amataj knaboj li perdis ambaŭ : la pli aĝa estis mortigita okaze de kverelo, la alia pro alkoholismo. Tute sola, kvankam multkonata kaj ŝatata gazetisto kaj verkisto li iom post iom falis en mallaborem, enuon kaj mizantropcon. Pli ol sepdekjara, verŝajne laca je vivo aŭ deziranta novan aventuron la kuniĝis kun la trupoj de Pancho Vila en Meksikio. Kion li fariĝis 2 Neniu scias. Ambrose Bierce diseriĝis en la spaco.

La verko de tiu neordinara viro estas mallonga sed profunda. Inspirita de la morto — fakte de la timo de la morto — de sia malamo al sia patro kaj al malriĉeco, li verkis ĉefe terurigajn noveletojn kaj ŝengenajn fablojn kaj difinojn, neniigante la « bonajn sentojn » kaj la bonfarojn de nia mondo.

..

Jen kelkaj eroj el la verko de Ambrose Bierce.

El la « Vortaro de la Diablo » :

Cerbo : aparato dank'al kiu ni pensas, ke ni pensas.

Sola : en malbona kompanio.

Laboro : procezo dank'al kiu A akiras profitojn por B.

Feliĉo : agraba sento, kiun ni spertas, kiam ni konstatas la malfeliĉon de la aliaj.

Novedzino : virino, kiu havas belan feliĉon-plenan estontecon post si.

Filozofio : tabelo el pluraj vojoj kiuj iras de nenie al nenio.

Barometro : genia instrumento, kiu indikas la nunan veteron.

Grandaĝeco : neofta daŭrigo de la morto-timo.

..

Kaj nun kelkaj tipaj fabloj.

— La Brava Ŝipanaro de sav-stacio estis laŭnĉonta boateton sur la maron por fari gardado-rondiron, kiam ili vidis, je distanco, boaton, kiu ĵus renversiĝis. Dek viroj sin alproĉis ĉe la kilo.

« Ni estas bonŝancaj, diris la Brava Ŝipanaro. Ni ĝustatempe rimarkis tion. Ni riskis sperti la saman sorton. » Ili reŝovis la boateton en ĝian tenejon kaj restis sanaj kaj savitaj sur la bordo, pretaj daŭre servi al sia lando.

— Sovaĝa ĉevalo, kiu ĵus renkontis doman ĉevalon, ĝin incitetis pri ĝia sklava vivo. La malsovaĝa besto diris ke ĝi estis tiel libera kiel la vento.

« Se tia vi estas, diru al mi, mi petas, kiu estas la uzo de la mordaĵo kiun vi havas en la buŝo ? »

« Tio estas el fero. Unu el la plej bonaj ekzistantaj fortigiloj. »

« Sed, kion signifas tiu konduk-rimeno, kiu pendas de ĝi ? »

« Ĝi malhelpas la mordaĵon elfali, kiam mi estas tro maldiligenta. »

« Kaj la selo ? »

« Kiam mi estas laca mi sidas sur ĝi kaj rajdas ! »

— Leono vagis en arbaro kiam dorno eniĝis en ĝian piedon. Ŝafisto ĝin eltiris, kaj la leono, kiu ĵus manĝis alian ŝafiston ne domagiis lin. Kelkajn tagojn poste, la ŝafisto, maljuste akuzita estis ĵetita en la fosaĵon de la leonoj. Kiam la bestegoj estis tuj formangonta lin, unu el ili diris :

« Jen la viro, kiu eltiris dornon el mia piedo ».

La aliaj leonoj foriris kaj tiu, kiu ĵus parolis formangi lin tute sola.

POR VIA DISTRO



NIA KONKURSO :

3-a problemo (16 poentoj gajnotaj)

En tiu bildo ok infanoj estas multokupotaj. Ili preparas donacojn. Kiuj estas tiuj 16 donacoj ?

Sendu viajn respondojn al : S-ro Chevalier, 19, bld G.-Lauriol, Nantes (L.-A.) - Francujo.

temas pri levilo kun malegalaj brakoj. Oni unue serĉu la mezon de la trunko, kiu estos la apogpunkto. Oni poste metu sur la maldikan ekstremon pezajn aĵojn por atingi ekvilibron. Oni tiam povas pesi la datojn atente ke la saketoj estu je sama distanco ĉiuflanke de la apogpunkto.

AMILZAJ PROBLEMOJ

SOLVO DE LA PROBLEMO :

« LA LASTAJ DAKTILOJ » :

La partigo estas malĝusta. La saketo ĉe la pli deka ekstremo estas pli peza, pro tio

NOVAJ PROBLEMOJ (S-ro Jarlier)

Paradokso : Ĉiuj nombroj estas egalaj ! Pruvi !


La globetoj : Petro kaj Johano havas ambaŭ kune 87 globetojn. Ili ludas. Petro gajnas 8 globetojn kaj posedas nun dufoje pli da globetoj ol Johano. Kiom da globetoj havis ĉiu ludanto antaŭ la ludo ?




BONHUMORO



« Rigardu, kion mi trovis en la malnova kofro ! »



« Ni venas por la novjara donaco ! »
« Sovu ĝin sub la pordo ! »



« Feliĉan novjaron ! »

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgijo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18 (50 fcs).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : S-ro Lehotkay K. Ferenc, ul Petefij eva 27, ZRENJANIN (300 din).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (5 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (4,5 sv. Frank.).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por ekterni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo